

- OED = *The Oxford English Dictionary*, 2. Aufl. vorbereitet von J.A. Simpson & E.S.C. Weiner. Oxford: Clarendon Press, 1989. 20 volumoj.
- Pfeifer, Wolfgang. *Etymologisches Wörterbuch des Deutschen*, 3. ungekürzte Auflage. München: Deutscher Taschenbuch Verlag, 1999.
- Pokorny, Julius. *Indogermanisches etymologisches Wörterbuch*. Bern: Francke, 1959, 1969.
- Rix, Helmut & Martin Kümmel. *Lexikon der indogermanischen Verben. Die Wurzeln und ihre Primärstammbildungen*, 2. erweiterte und verbesserte Auflage. Wiesbaden: Reichert, 2001.
- Vasmer, Max. *Russisches etymologisches Wörterbuch*. Heidelberg: Winter, 1950-1959.
- Vendryes, J. *Lexique Etymologique de l'Irlandais Ancien*. TU. Dublin: Dublin Institute for Advanced Studies kaj Paris: Centre National de la Recherche Scientifique, 1978.
- Viereck, Wolfgang. Pri la kulturhistorio de Eŭropo / Zur Kulturgeschichte Europas. *Acta Sanmarinensia Academiae Internationalis Scientiarum*, vol. 5, n-ro 3, 2000.
- Viereck, Wolfgang. Laboristo, Arbeiter, ouvrier, workman, raboĉij, obrero, operaio – etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj pri la plurlingveco de Eŭropo, *Scienca Revuo* 55, 2004, 163-178.
- Wade, Terence. *Russian Etymological Dictionary*. Bristol: Bristol Classical Press, 1999.
- Walde, Alois. *Lateinisches etymologisches Wörterbuch*, 3. Auflage, herausgegeben von Johann B. Hofmann (*Indogermanische Bibliothek. Zweite Reihe: Wörterbücher*). Heidelberg: Winter, 1930-1956.
- Wolf, Siegmund A. *Großes Wörterbuch der Zigeunersprache (romani tšiw): Wortschatz deutscher und anderer europäischer Zigeunerdialekte*. Mannheim: Bibliographisches Institut, 1960.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Dr.h.c.mult. W. VIERECK
 Obere Dorotheenstr. 5a
 DE – 96049 B a m b e r g
 GERMANIO

<wolfgang.viereck@split.uni-bamberg.de>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas emerita profesoro por anglaj filologio kaj mezepoka literaturo ĉe *Bamberg-Universitato*, Germanio. Li instruis ĉe Universitato de *Graz* (Aŭstrio) kiel plenranga profesoro kaj ĉe universitatoj de Israelo, Hungario, Pollando, Estonio, Ukrainio kaj Japanio kiel gast-profesoro.

Tradicioj de Moliero en la komedio de *Dancourt** "Somero de Koketulinioj"

MURSALIJEVA Ljudmila

Enkonduko

Ĉe la limo de la XVII/XVIII-a jarcento la verkaro de la franca komedi-verkisto Moliero (1622-1673) restas modelo por multaj dram-verkistoj. Oni studis verki laŭ liaj komedioj, "...oni legis lin, studis lian poetikon; oni serĉis modelojn ne en la verkoj de Horacio, Aris-totelo, *D'Aubignac*; nur Moliero estis modelo".⁽¹⁾

Moliero estis granda reformanto de la franca komedio kaj li donis tre fortan impulson al ĝia evoluo. En lia verkaro troviĝas la fontoj, kiuj determinis daŭran evoluon kaj diversecon de la franca teatro. Multaj komediverkistoj volonte uzis temojn de molieraj komedioj, liajn situaciojn kaj personojn.

La plej lertaj talentuloj inter ili kree prilaboris la tradicion de Moliero kaj aldonis al siaj verkoj novajn aktualajn temojn kaj epokajn problemojn. Kune kun nova temaro aperis novaj komediecaj tipoj, kiujn la komedioj de Moliero ne konis: ruiniĝintaj aristokratoj, vivantaj je konto de virinoj ("bonŝanculo" *Baron* en la verko de *Dancourt* "Laŭmoda kavaliro"); virinoj-aveturistinoj, kiuj strebas allogi kaj ĉarmi virojn – tiujn, kiuj povus esti utilaj por ili ("Altnivelaj burĝinoj" de *Dancourt*).

Multaj tiuepokaj komedioj respegulas la pasion de hazardludoj en diversaj sociaj tavoloj ("Hazardludanto" de *Regnard*, "Kavaliro-hazardludanto" de *Dufresny* kaj aliaj).

Oni povas observi, ke en tiu periodo la komedia ĝenro evoluas de la komedio de karakteroj al la komedio de moroj.

* vera nomo: *Florent Carton*, franca dramverkisto kaj aktoro, vivis 1661-1725, kiel esperantigita nomformo plej konvena: Dankuro

Postmoliera periodo

Dankuro (*Dancourt*) estis unu el la plej talentaj komediverkistoj de la postmoliera periodo. Lia verkaro estas larĝa kaj varia. Li verkis pli ol kvindek komediojn en versoj kaj en prozo: kvinaktajn, triaktajn kaj plejparte unuaktajn, t.n. "dankuraĵoj". Liaj komedioj pentras karakterajn fenomenojn de sia epoko. Sur la scenejo aperas kamparanoj, sed ankaŭ burĝoj, kiuj strebas vivi larĝskale, kiuj aĉetas kastelojn, terenojn kaj aristokratajn titolojn ("Eksterurba domo", "Vilaĝa festo", "Altnivelaj burĝinoj" k.t.p.).

Dankuro kree transformas la tradidicojn de Moliero, sen kopii sklave liajn situaciojn kaj karakterojn. Ni vidas la influon de Moliero en la ĝenerala orientiĝo de lia verkaro. Dankuro sekvas la vojon, indikitan de Moliero en "Ridindaj preciozulinoj".

Analizu ni tion laŭ ekzemplo de la du verkoj: "Ridindaj preciozulinoj" de Moliero kaj "Somero de koketulinioj" de Dankuro.

La moliera "Ridindaj preciozulinoj"

Moliero strebis primoki la aristokratan preciozan kulturon, larĝe akceptitan en la franca socio, montri ĝian malsincerecon kaj malutilon. Pro taktikaj kaj cenzuraj kialoj la ĉefaj personoj – preciozulinoj Madlino (*Madelon*) kaj Katino (*Cathos*) apartenas ne al la aristokrata, sed al la burĝa socio. Ili estas provincianinoj, nur antaŭ nelonge venintaj vivi en la ĉefurbon kaj ili ege strebas sekvi la modon. En sia antaŭparolo al la eldono de la komedio de 1680 Moliero kun preskaŭ nekaŝita ironio avertas la legantojn, ke la komedio primokas ne verajn, sed nur falsajn preciozulinojn, kiuj malbone kopias la manierojn de la veraj, kaj ke "Ridindaj preciozulinoj" neniam transpasas "... la limojn de satiro deca kaj permesita ...".⁽²⁾

Sed necesas noti, ke jam post la unua spektaklo la veraj preciozulinoj estis ŝokitaj kaj ofenditaj de la komedio. La konflikto baziĝis ne sur kontraŭstaro de "veraj" kaj "malveraj" preciozulinoj, sed sur la kontrasto de "vera" kaj "malvera" vivokoncepto. La eventoj de la komedio okazas en Parizo, en la domo de burĝo Gorĵibuso (*Gorgibus*), kiu trovis por sia filino Madlino kaj nevino Katino konvenajn – el lia vidpunkto – fianĉojn el la burĝa medio: Lagranĵo (*La Grange*) kaj Dukroazio (*Du Croisy*). Gorĵibuso tute ne interesiĝas pri la sentoj kaj korinternaj deziroj de la du junulinoj.

Madlino kaj Katino troviĝas sub influo de la "precioza kulturo": ili revas pri nebulecaj ĵuroj je eterna amo, pri noktaj sekretaj rendezuoj, pri forrabo de fianĉino – sed Lagranĵo kaj Dukroazio simple parolas al ili pri geedziĝo. La junulinoj estas senreviĝintaj kaj opinias, ke la fianĉoj estas malbone edukitaj, ĉar en la romanoj de sinjorino *Scudéry* la amantoj sin kondukas tute alimaniere. La fianĉoj estis do forpuŝitaj pro "malafableco" kaj "burĝeco". La junaj preciozulinoj estas malkontentaj pro ilia ne sufiĉe nobla deveno, pro ilia plumpa konduto, kiu kontraŭas "al la bona tono" kaj "la etiketo" de preciozaj salonoj kaj galantaj romanoj.

Madlino koleriĝas pro la "popolaĉa" parolmaniero de Gorĵibuso kaj de la servistino. Ŝi, same kiel Katino, larĝe uzas perifrazojn kaj liberecajn esprimojn por substreki la rafinecon de sia naturo kaj malproksimeco de ĉiutagaj zorgoj. Ili diras "kuriero" anstataŭ "lakeo", "komforto de konversacio" anstataŭ prozeca "fotelo", "konsilianto de Gracioj" anstataŭ "spegulo" k.t.p. Stulta ludo kun la vortoj donas la strebon ludi kun la amo, ludi en reala vivo nerealajn scenojn el laŭmodaj romanoj.

En la verko de Moliero la tipo de preciozulino estas prezentita dufoje pere de du junulinoj – nome per Madlino kaj Katino, kiuj kompletigas unu la alian kaj, samtempe, prezentas variantojn de sama tipo. Madlino esprimas siajn pensojn pli kuraĝe, ĉar ŝi estas la filino de la dommastro. Ŝia kuzino (Katino) estas sub ŝia influo.

Lagranĵo kaj Dukroazio sentas sin ofenditaj pro la trofiereco kaj aroganteco de la junulinoj kaj decidas doni al ili "bonan lecionon". Ili vestas siajn lakeojn Maskarilon kaj Ĵodleon per riĉaj aristokrataj kostumoj, "donas" al ili titolojn de "Markizo" kaj "Vikonto" kaj sendas ilin por viziti la preciozulinojn.

La novaj "aristokrataj" kavaliroj, kiuj facile estas ekkoneblaj kiel kopioj de la precioza stilo, entuziasmigas Madlinon kaj Katinon. En apogeo de balo, donita de "markizo" Maskarilo, Lagranĵo kaj Dukroazio aperas kaj senmaskigas la pseŭdoaristokratojn.

La verko havis larĝan socian rezonancon, la aŭtoritato de precioza kulturo estis subfosita. Moliero sukcesis en la arta formo montri la plej karakterizajn trajtojn de la "precioza kulturo". La personecoj de Madlino, Katino, Maskarilo kaj Ĵodleo estas troigitaj kaj komikaj, sed samtempe ili havas vivajn trajtojn de veraj preciozul(in)oj. Ili estas individuaj kaj tipe nuntempaj.

La dankura "Somero de koketulinioj"

Same kiel Moliero en "Ridindaj preciozulinoj", ankaŭ Dankuro en sia komedio "Somero de koketulinioj" akcentigas la morojn. Sed ĉi tie estas malfacile vidi iun ĉefan personon. En la centro de la komedio estas multaj personoj, unuigitaj pere de la sama socimedia, de similaj vivpozicioj, de samaj mankoj kaj difektoj.

Afliktiga malkovro

La eventoj okazas somere en Pariza domo de la koketulino-aristokratino Anĵeliko (*Angélique*). Ŝi ne strebas edziniĝi, sed ŝi ege ŝatas koketi kun ĉiuj viroj. Ŝi estas sprita kaj havas multajn sopirantojn, sed vere amas neniun. Tamen – estas juna viro, kiu ŝajnas al ŝi pli ol nur agrabla. Sed **antaŭ unu monato** li adiaŭis kaj foriris al la milito. La juna viro nomiĝas Klitandro (*Clitandre*).

Anĵeliko havas amikininon Sidaliso (*Sidalis*), kiu havas iom alian karakteron: Sidaliso amas junan viron, kiu **antaŭ du semajnoj** forlasis ŝin por militiri. Ŝia amanto nomiĝas Klitandro. Vizitis la amikinojn la maljuniĝinta koketulino, grafino Demartenseko (*de Martin-Sec*), kiu rakontas pri sia amato, kiu **hieraaŭ** forveturis por partopreni je iu milito – kaj la grafino estis paginta lian tutan ekipaĵaron. La amanto nomiĝas Klitandro.

Iom post iom la virinoj komprenas, ke ili ĉiuj tri parolas pri la sama viro, kiu unu monaton antaŭe adiaŭis Anĵelikon, pasis du semajnojn kun Sidaliso, forlasis ŝin por resti du semajnojn ĉe la grafino, kiun li nur hieraaŭ adiaŭis. La tri trompitaj virinoj reagas tute diversmaniere post tiu afliktiga malkovro. Anĵeliko primokas sin mem, la aliajn virinojn kaj Klitandron. Sidaliso estas ĉagrenita; ŝi diras, ke ŝi neniam plu fidis al iu ajn viro.

En la domon de Anĵeliko venas de tempo al tempo ŝiaj sopirantoj: respektinda financisto, stulta instruisto pri kantado, enuiga pastro – ili ĉiuj respegulas la karakterajn trajtojn de siaj samtempuloj. Iun belan tagon tute neatendite aperas en la anĵelika domo – Klitandro! Li diras, ke sole pro ŝi li decidis, lasi la militon kaj reveni al ŝi. Sed, vidante ĉiujn siajn iamajn amatinojn kune, li ekmensogas por pretekste elturniĝi el la malagrabra situacio.

La grafino ĥileras pro la klitandra malfideleco. Sed ŝin konsolas la fakto, ke estis ŝi la lasta persono, kiun Klitandro vizitis antaŭ la "mi-

litirado". La komedio finiĝas per gaja repaciĝo: Anĵeliko kaj Sidaliso "cedas" Klitandron al la grafino, kiu ja jam "aĉetis" lin – paginte ĉiujn liajn "militrajn" elspezojn. Nun ĉiuj iras kune tagmanĝi.

Karakteroj de la protagonistoj

"Somero de koketulinioj" estas gaja kaj gracia komedio, pentranta la morojn de monduma socio. La tipo de koketulino estas prezentita trifoje pere de tri virinoj, kiuj kompletigas unu la alian.

Anĵeliko apartenas al tiu tipo de virinoj, kiu ne povas vivi sen koketi. Koketado estas ŝia vivo, ŝia vivmaniero – ne por atingi iun celon, ne por edziniĝi, sed koketadi pro koketado: somere aŭ dummilite, kiam soldatoj (kiuj ja ĉiam havas grandan sukceson ĉe virinoj) forestas.

Tiam la koketulinioj devas sin kontentigi per la kompanio de financistoj, pastroj, juĝistoj, kant-instruistoj k.t.p. Anĵeliko estas tre sprita virino, ŝi primokas ĉion kaj ĉiun – kaj tio distras ŝin.

Sidaliso estas pli sentema. Ŝi ankoraŭ kapablas suferi pro amo. Sed ankaŭ ŝi primokas la kavalirojn de Anĵeliko. La grafino, kiel la plej aĝa, estas pli vivosperta. Ŝi konas la valoron kaj la povon de mono. Ŝi alproprigas Klitandron kvazaŭ "aĉetita aĵo". Fine ŝi pardonas lin, kondiĉe ke li ŝajnigas ami ŝin. Ĉi tie la aŭtoro montras la plej malbelan formon de koketeco.

La historio de la malĉastulo kaj dezertinto Klitandro estas rakontata en la komedio tamen sen iu ajn morala aŭ socia akuzo. Laŭ la ideo de la aŭtoro, tio ĉio estas "ĉarmaj ŝercoj kadre de la socio", kiuj kaŭzas sole rideton. Dankuro konkludas, ke mondumaj koketulinioj neniam konsterniĝe perdu la kapon kaj trovu plezuron en ĉiu situacio.

Do, la tri virinoj prezentas tri variantojn de koketulinioj. Dankuro, same kiel Moliero en "Ridindaj preciozulinoj", ne antaŭmetas kaj pligravigas iun unusolan protagoniston kiel portanto de speciala karaktertrajto. Anstataŭ, li disdonas ĉion al tri personoj, montrante la diversajn variantojn de koketeco. Li pentras morojn, la ligojn inter karakteroj kaj moroj. "Dankuro estas pli sociologo ol moralisto, lin pli interesis la medio ol la apartaj personoj, kiujn li difinis pere de iliaj funkcioj, iliaj devenoj aŭ iliaj profesiaj okupoj." ⁽³⁾

Fina rimarko

Ni vidas, ke Dankuro sekvas Molieron, kaj kree evoluas ties tradiciojn – laŭ kompozicio, karakteroj, aktualeco de temaro kaj moroj. Lia komedio "Somero de koketulinioj" similas al la verko de Moliero, kvankam ĝi ne atingas la saman profundecon kaj akrecon.

La karakteroj pentritaj de Dankuro venas el la reala vivo, sed li ne "enprofundigis" ilin. Moliero "... evoluis la plej progresemajn trajtojn de klasikisma stilo. En lia verkaro la klasikismo transpasas siajn stilajn limojn kaj iĝas ligo inter realisma arto de Renesanco kaj la realismo de novaj tempoj." ⁽⁴⁾

La sama satir-realisma tradicio evoluas en la verkoj de Dankuro.

Notoj

⁽¹⁾ *Gazier A.* : "La comédie en France après Molière". *Revue des cours et conférences*, 1909, 16 dec., p. 200

⁽²⁾ *Molière J.-B.* : "Précieuses ridicules", cit. laŭ libro: "Théâtre complet de Molière", vol.1, p. 184

⁽³⁾ *Blanc A.* : "Dancourt. La comédie française à l'heure du soleil couchant", Parizo, 1984, vol.1, p.358

⁽⁴⁾ *Bojadžiev, G.* : "J.-B. Molière" en la libro "Molière", verko en 2 volumoj, Moskvo, 1957, vol.1, p. 48

Adreso de la aŭtorino (laŭ oficiala rusia poŝtadres-skribmaniero)

RUSIO

450044, Ufa – 44

ul. Komarova 26 kv.21

Mursalijeva Ljudmila

tel. (7 – 3472) 42 03 42

Priaŭtora informo

La aŭtorino doktoriĝis pri franca filologio kaj nun docentas ĉe Baŝkiria Ŝtata Universitato en la katedro de historio pri eksterlandaj literaturoj kaj monda kulturo.

Enzimoj – proteinaj biokatalizantoj

Rüdiger SACHS

Enkonduko

Jam de plej antaŭaj tempoj oni utiligas enzimojn de vivaj mikro-organismoj – ekz. por bierofarado, fermentado de vino, ĉe preparado de vinagro, pano, fromaĝo, acidbrasiko, acidlakto kaj similaj manĝaĵoj. Tiam ne estis konataj la kaŭzoj por la okazantaj – tamen „videblaj“ – procesoj, sed la tiamaj homoj sukcese profitis el tiuspecaj „bio-agadoj“.

Enzimoj el buĉbestoj kaj plantoj

La malkovro de pepsino kaj aliaj digestenzimoj en la 19-a jarcento sekvigis ties ekstraktadon el buĉitaj bestoj. Eĉ nuntempe oni produktas krudajn enzimojn el la mukozo (ekz. pepsino) de bovo, bovido, ŝafoj kaj porkoj, el la abomaso (ekz. labfermento aŭ "himosino", t.e. enzimo malkombinanta proteino) de ankoraŭ lakton suĉantaj bovidoj kaj ŝafidoj, same kiel el la pankreato de porko kaj bovo la tripsinon, pankreatinon kaj amelazon. Precipe taŭgaj enzimpliverantoj estas ĉiuj organoj kun alta metabolpovo; al tiaj apartenas ankaŭ la koro, lieno, hepato, la renoj, la duodeno kaj la muskolaro.

Ankaŭ plantaj enzimoj estas ekzamenitaj pri taŭgeco por industria uzado. Greno kaj cerealoj liveras, post ŝvelado kaj ĝermado, la maltan; malto liveras maltozon (aŭ maltosukeron, la amelkombinantan enzimon) kaj la proteinkombinantajn proteinazojn. Fruktoj de tropika origino liveras tutan "sortimenton" de proteolizaj (do proteinkomponentaj) enzimoj kiel ekz. la "papainon" el la papajo (noma ankaŭ "melonarbo") resp. ties fruktoj, kaj la "ficinon" el la figo kaj la "bromelainon" el la trunketo de la ananaso.